

TEA-BULTENO

26ª JARO - N°165 **JAN-FEBR-MAR-APR** **N. 1-2-3-4/2023**

La senvalorigo de la homa mondo kreskas samproporcie al plivalorigo de la aĵa mondo.
Karl Marx, germana filozofo, historiisto, verkisto (1818-1883)

Saluton al mia kara Legantaro!

Denove pasis multe da tempo, depost la laste aperinta TEA-Bulteno. Fakte ĉi bulteno rilatas al eĉ 4 monatoj, ne plu al du! Ja, malfacilaj tempoj!

Se oni rigardas iom supren, en ĉi paĝo, piede de la *gazetisto*, legeblas, kiom da jaroj oni redaktis ĉi informilon kaj kiom da numeroj entute aperis. Eĉ mi mem ne povas kredi. 25 plenajn jarojn regule la Bulteno atingis vin. Mi diris regule, kvankam ne tiel estis dum ĉi lastaj 3 jaroj, pro diversaj kialoj. Tamen, malgraŭ ĉio, estis publikigitaj **165** numeroj - laŭ mi temas pri sufiĉe kontentiga nombro por eta asocia informilo. Multaj el vi akompanis ĝin ĝis ĉi lasta ŝtupo, ero de longa ŝtuparo, kaj tiujn, kiuj fidele kaj konstante ĝin legis, mi tre dankas.

Probable ĉi tiu estos la lasta, kiun vi ricevos. Malgaje tiun ĉi decidon mi alprenis, ĉar estas malfacile deklari la finon de io, kio naskiĝis danke al subteno de geamikoj kaj kio akompanis onin dum kvarono de jarcento. Sed tia estas la vivo: cirkonstancoj ŝanĝiĝas, devoj plimultiĝas, mankas persono(j) al kiu(j) pludoni la torĉon, dume eksmodiĝis tiaj ĉi komunikiloj en mondo ĉiam pli virtuala, kie novaĵoj malaktualiĝas post nur unu minuto, mondo kiu rigardas al estonteco en la klopodo forgesi la pasintecon. Cetere eĉ ĉi miaj ĵus eldiritaj pensoj ja evidentigas mian personan elmodiĝon, malmoderniĝon, do konklude ne plu taŭga por transdoni ion apartan, ion tiklan, interesovekan al vi.

Verdire mi havas ankoraŭ multon por rakonti, multon por diskuti kun mia supozata publiko, sed, kiel diris nia kara Zamenhof: "ja temp' està", por ke ĉesu ĉi mia "bela sonĝo", nome la revo ke la modesta TEA-Bulteno estis plaĉa al vi kaj iel ĝi agrabligis iun ajn vian vivmomenteton.

Plej korajn salutojn kaj dankon pro via atento!

Via redaktanto Elda Doerfler

Bonvenon, Maria Theresia!

Kialo de tiu ĉi artikolo estas ne prezenti *Maria-Theresia*-n, kies historio certe estas konata de la plimulto de mia estimata legantaro, sed nur informi, ke en Triesto, je la 7ª de februaro 2023, finfine inaŭguriĝis monumento al ŝi dediĉita.

Pri tio mi jam skribis antaŭ tri jaroj [*TEA-Bulteno 150-Jan-Febr 2020*], kiam monkolektado plene kontentigis kaj diversaj burokrataĵoj, *baldaŭ solvotaj*, esperigis, ke en proksima tempo aperos en urba placo la elektita projekto pri la monumento. Nu, pasis tagoj, semajnoj, monatoj kaj jaroj kaj preskaŭ oni ektimis, ke tio neniam konkretiĝos, sed post 3 plenaj jaroj triestanoj feliĉe ĉeestis ĝian senvualigon.

Ĉi-foje mi nur (re)rakontos pri la ligoj inter la Imperiestrino kaj Triesto. Maria Theresia, kiel sciate, naskiĝis en la tre fora 1717ª jaro. Ŝi estis la unua kaj ununura aŭstria virino kiu regadis sur la teritorioj de la Habsburga monarkio: fakte ŝi estis protagonisto de la granda sukceso de tiu dinastio. En la dua duono de la 18ª jarcento, per siaj reformpolitiko kaj avangarda rigardo al estonteco, ŝi sukcesis konstrui solidan administran strukturon, kio permesis al ŝi mastrumi optimume treege vastajn teritoriojn.

Ekzemplodona estis ŝia agado cele al reformado de la regna socio kaj tio kontribuis al ŝia famo, ĝis la nuntempo. Ŝiaj reformoj tuŝis la ĉefajn kampojn de ĉies vivo, kiel medicinon, instruadon kaj ekonomion... Politike, ŝi instigadis al ĝenerala reordigado de la institucioj kun aparta atento al renoviĝo kaj moderniĝo. Oni devas scii, ke la imperiestrino enkondukis la devigon al vakcinado, post kiam ŝi mem malsaniĝis je variolo; krome danke al ŝi tute aliiĝis la malnova burokrata sistemo, kiu estiĝis tute bone funkcianta kaj alcentrigita.

Atentindaj estis ŝiaj modifoj de la Eklezio kaj religio: estis reduktitaj kelkaj privilegioj de la pastraro kaj garantiita la kulta libereco.

Sed nun ni vidu, kion Maria Theresia faris favore al Triesto. Tre grave ŝi kontribuis al ĝia disvolviĝado kaj progresado. Dum ŝia regado, ĝi kreskadis kaj evoluis, tiom ke ĝi iĝis internacia rilatpunkto, vojkruciĝo de komercoj kaj kulturoj. Ŝi celis doni al Triesto apartan destinon, igante ĝin urbo malferma al interŝanĝo kaj ĉiuspeca cirkulado, ne nur de varoj kaj homoj sed ankaŭ de novigaj ideoj. La pluretna

→

spirito kaj ekspansio de la maraj linioj konsiderinde kontribuis al plivastigado kaj plifirmigado de la havena potencialo. Alia ŝia deziro estis stimuli al modernigado de la arkitekturo kaj pli sistema planado urba. Pro ĉio ĉi imperiestrino Maria Theresia estis, kaj ankoraŭ estas, vere amata kaj daŭre memorigata de la tuta urbo, urbo kiun ŝi neniam honoris per sia vizito.

Tial hodiaŭ, finfine, la civitanaro povas atesti konkrete sian dediĉemon kaj amon al Ŝi per granda monero (talero) starigita centre de la urbo, en *Borgo Teresiano* (kvartalo Tereziano), apud la Granda Kanalo kie iam ankriĝis la velŝipoj plenplenaj je varoj.

Aldonindas ankoraŭ unu detalo, eta sed tre grava, pri la avantaĝoj gajnitaj de la urbo, danke al tiel persista interesiĝo de la imperiestrino. En malmulte da jaroj ŝi sukcesis transformi ĝin de vilaĝeto, kun ne pli ol 3 000 personoj, al moderna centro loĝata de pli ol 200 000, venintaj el Mediteraneo kaj Orienteŭropo kaj kunportintaj proprajn tradiciojn kaj religiojn: hebreoj, grekoj, kroatoj, serboj, armenoj, turkoj, kiuj en la tempopaso, sentiĝis en Triesto kiel en sia propra naskolando, atestita de la fakto ke ĉiu ajn etno rajtis starigi siajn preĝejojn kaj tombejojn kaj edukejojn, riĉiĝis per siaj komercaĵoj, tiel plene integriĝante al la loka loĝantaro.





Kaj nun kelkaj klarigaj notoj pri la monumento. Unue pri la projekto, elpensita de junula triopo: Nicola Facchini, Elena Posckay kaj Eric Gerini, kiuj inspiriĝis de la "*Maria Theresia Taler*", monero ekcirkulanta en 1780 kaj utiligata en la internaciaj komercoj dum pli ol cent jaroj. Ĝi fakte estis konata ankaŭ trans la habsburgaj limoj, nome eĉ en Afriko, Arabujo kaj Hindujo.

Kiel sur la talero, aperas sur la antaŭa flanko de la monumento la dekstra profilo de la imperiestrino.

La celo de la verkintoj estis elvoki la valoron de la agado de Maria Theresia en Triesto. La granda monero estis enfiksita en la pavimo de placo *Ponterosso* (Ruĝa Ponto), kiel se, figurasence, la tuta triesta teritorio estus granda "ŝparmonujo", kies supozitaj kapabloj kaj riĉaĵoj povus esti ankoraŭ hodiaŭ ekspluatataj.



La malantaŭa flanko, tiu rigardanta al la Granda Kanalo, estas kiel spegulo, sur kiu ĝi reflektiĝas kun la ĉebordaj konstruaĵoj, en kies



teretaĝo trovis lokon grandaj magazenoj. Tie estis stokitaj la elŝipigitaj komercaĵoj, provizaĵoj kaj ĉiaspecaj varoj. La polurita flanko resendas la belaĵojn de tiu grava urba parto.

Teknikaj detaloj: la talero estis realigita per fandaĵo el bronza alojo, pezas 16 tunojn, havas diametron je 4 metroj kaj dikon je 22 cm. Ĝi estis fandita en Ŝtalfarejo-Fandejo - *Cividale del Friuli*.

Triesta kuriozaĵo: pasintece, estis kutimo meti taleron sub iu tegmenta tegolo de novkonstruita domo kiel signon de bonaŭguro.

Ĉu vi deziras ekscii, kiuj estis la komentoj de la triestanoj, post ĝia inaŭguro? Triestanoj havas ian apartan karakteron; *el foresto* (=la fremdulo), kiu povas esti kaj italo venanta eĉ nur de kelkaj km for de Triesto kaj iu ajn eksterlandano, unuavide ilin taksas: ili estas individuistoj, memlaŭdantoj, malbonedukitaj, egocentraj kaj... elmontriĝemuloj. Tamen ofte mi min demandas: kial tiom multaj venas al Triesto, ĉirkaŭrigardas, promenas, vizitas, amikiĝas, enamiĝas kaj ne plu deziras foriri? Se ni estas tiom malsimpatiaj, ili devus forfuĝi de ni kiel eble plej malproksimen!

Nu, mi iom deflankiĝis de mia supra demando, do jen al via juĝo la komentoj de kelkaj triestanoj:

1) Tre bela, noviga monumento;
2) Nebanala, kaptas la atenton;
3) Troa da brileco, ŝajnas ĉina manfaritaĵo, tre kiĉa;
4) Kio??? La malantaŭa parto estas tute nudaaa!
5) Ho, somere ĝi iĝos bruliga spegulo;
6) Maria Theresia estus meritinta *veran* monumenton;

7) Ĝi fariĝos la gvatejo de "*cocai*" [elp: kokài = mevoj] kaj malpuriĝos pro la abunda guano;
8) Nenia klariga tabelo ie troviĝas. Kiel *el foresto* povas kompreni, pri kio temas?

Triestano malofte silentas, daŭre grumblas, ironias kaj, ĉefe, satiras, sed fine... adaptiĝas al ĉio!

Iom mi deiĝis de la ĉefa temo, sed kial ne prezenti unu el la aspektoj de la triestana karaktero. Kion plej oni ŝatas, estas ridi, mokridi, ridindigi eĉ sin mem!

Je la unua tago de aprilo, kiel ankaŭ nia Majstro diris: *komenco Aprila, trompo facila*, oni devas atenti, ĉar trompaĵo sin kaŝas eĉ malantaŭ la angulo! Jen du ŝercetoj, pri kiuj triesta tagĵurnalo raportis. La unua rilatis al Akvario kaj al … Marko!



Per la supra foto mi prezentas al vi la Maran Akvarion, kiu estis konstruita en 1933 kaj kies bela turo, ĝin ornamanta, estis tuj baptita de triestanoj, kiel *Sankta Maria de l' Gobio*[1)], pro ĝia sonorileja aspekto. En la maldekstra konstruaĵo troviĝis la eksa centra fiŝvendejo, kie, en ĉiu frumatena tago, okazis fiŝaŭkcio, dum en alia parto de la salono trovis lokon fiŝbazaro malfermata al la loĝantaro.

Rilate al Akvario, tamen aldonendas grava sciigo, por kompreni la unuan ŝercon. En 1953 alvenis motorŝipe pingveno kaptita de iu maristo en la suda Poluso: la ĉarma besteto, kiu ricevis la nomon *Marko*, tuj trovis tute komforta la novan situacion kaj montris sin tre amema, amikiĝema kaj scivolema. Marko vivis en kaj ekster la akvario 32 jarojn, kio estas aŭtentika rekordo por pingvenoj. Ĝi aparte ŝatis kunestadon kun infanoj kaj geknaboj sed ankaŭ plenkreskuloj: kiam aperis iu kun fotilo enmane, tuj - kiel kinostelulo - ĝi alprenis ian ĉarman pozon; tre volonte ĝi bonvenigis freŝan fiŝeton, prefere engraŭlon, tamen iomete oni devis atenti, ne tro aŭdace ĝin ekkaresi, ĉar tiam li reagis per bekpiko! Post ĝia morto, sekve de nekropsio, oni malkovris ke ĝi ne estis pingveno sed pingvenino!!!



Post ĉi enkonduka historio finfine ni alvenas al la antaŭmenciita ŝerco. Antaŭ ĉ. du jaroj la komunuma administrantaro decidis, ke estas la momento por rememori tiun amiketon, tre amatan de triestanoj, per statuo, kiu devus esti lokita apud la enirejo de ĝia iama triesta hejmo. Kiel ofte okazas en mia urbo oni devas longe atendi ĝis io decidita fine realiĝu, tial la unuan de aprilo ĉijara, kiuj promenis ĉe la marbordo, havis la surprizon ekvidi ne ununuran bildon de la fama Marko, sed eĉ dek.



Iu mistera artisto, en la nokto inter la 31ª de marto kaj 1ª de aprilo, starigis sur la ŝtupoj de Akvario dek diversdimensiajn pingvenojn el dika kartono, kolorigitajn blanke kaj nigre, atendantajn la alvenon de la statuo.

La aŭtoro informis, ke se oni deziras forpreni unu el tiuj, oni rajtas tion fari, kondiĉe ke ĝi estu konservata proprahejme aŭ en iu alia ejo, prefere videbla de la publiko. Tre simpatia ŝerco, ĉu ne?

Kaj jen la dua: *Flugi? Volonte!* Temas pri satira elpenso de triesta triopo, kiu anoncis en *Fb* [ĉu *vizaĝlibro*???], ke la Flugkompanio *Terĝestina* startigis novajn kunligliniojn inter Triesto -Vieno kaj Triesto-Budapeŝto per malnovaj flugmaŝinoj el sovetia periodo. La flugoj okazos trifoje semajne je ridindaj kostoj, nome po 29 eŭroj kurse. Oni aldonas, ke horaroj kaj flug-tagoj aperos tre baldaŭ.

Se vi estas prie interesata, vidu: *vilEvampi (https://www.facebook.com/vileandvampi*

Ridado ĉiam bonas por la sano!

ElDo

---

1) gobio = malgranda sed tre bongusta fiŝo, iam abunde kaptita en la golfo, nun preskaŭ malaperinta.

CERBOTIKLILO de VIGLO

Malkovru la proverbon!

AR	G	ARA	JB
ANT	ED	A	IĜ
EE	IA	Z	ON
SD	R	AR	O.

Per movo de unu paŝo, kiel la reĝo sur ŝaktabulo, tuŝu nur unufoje ĉiujn ĉelojn: eblos tiel legi zamenhofan proverbon.

Startu de la flava ĉelo.

(Solvo… iam!)

Meduzoj en niaj teleroj

En la lasta TEA-Bulteno, fine de 2022, mi estis proponinta vespermanĝon el lokustoj. Neniu komento prie atingis min, mi estas tamen scivolema, ĉu vi provis aŭ ne gustumi insektojn. Mi devas konfesi, ke mi mem tute ne emas - kaj eble neniam emos - maĉi tiujn bestetojn. Sed, se kiel oni asertas, tiuj ĉi fariĝos ĉies normala nutraĵo en ne tro malproksima tempo por alfronti la estontajn defiojn nutradajn kaj mediajn, plej probable ankaŭ mi devos adaptiĝi al la situacio. Tamen, kredeble, antaŭ ol preni la finan decidon, pasos signife multe da tempo kaj, preskaŭ certe, mi havos la eblon gustumi ankoraŭ longe miajn preferatajn pladojn: vermiĉelojn kun raguo, frititajn anĉovojn, picojn kaj ĉiujn aliajn bongustaĵojn proponitajn de la mediteranea dieto, kiajn pastaĵojn, legomojn, panon, rizon k.a.

Jam antaŭ kelke da jaroj legeblis la informo, ke ekzemple ankaŭ meduzoj eniris la liston de tiel diritaj *Novaj manĝaĵoj*, reglamentitaj de Eŭropa Komisiono. Tiu listo daŭre plilongiĝas, pro la tutmondiĝo kaj sekva kontakto kun diversaj popoloj, sed ankaŭ pro la daŭra serĉado de novaj nutrofontoj respekte al ekologia daŭripovo.

Dum mia lasta vizito de Ĉinio, 2011, okaze de la Internacia E-Konferenco en Wuhan, mi havis okazon manĝi meduzojn: tiuj verdire ne min entuziasmigis, nek tamen min naŭzis - miaguste ili havis nenian apartan saporon. Certe tio dependas ankaŭ de la aliaj kuningrediencoj… Kiom da landoj tiom da kutimoj!

Iam okazis en mia ĉemara urbo sufiĉe impeta maralfluo kaj la ondoj ĵetis sur la plaĝon grandan kvanton da meduzoj. Tial pluraj ĉinaj *triestanoj* alkuris al tiu neatendita donacejo kaj klopodis kapti kiom eble plej da bestoj. Bedaŭrinde por ili, tiu ekscitita svarmado de meduzkaptantoj estis ekvidita de policanoj, kiuj tuj ĉesigis la rikoltadon, minacante ilin per monpuno. Konklude, la kompatindaj ĉinoj estis devigataj remeti sur la ŝtonan plaĝon siajn kaptitaĵojn, tute ne komprenante la kialon de tiu, por ili absurda, malpermeso.

En Azio ekzistas tradiciaj pladoj el meduzoj, kiujn ĝenerale oni manĝas aŭ salate aŭ tempure[1)]. En Ĉinujo oni preferas la sekigitajn aŭ frititajn meduzojn; en Japanujo tempure; en Tajlando la meduzoj aliiĝas al vermiĉeloj; en Vjetnamujo salate kun akompano de fruktoj kaj legomoj.

Sed certe oni sin demandas: kial oni devus komenci manĝi meduzojn? Nu, tutunue oni trankviliĝu, ĉar neniu devigas aŭ devigos, manĝi kion oni malŝatas: tio ĉi estas certe klara, ĉu ne? La fakto estas, ke la FAO (*Food and Agriculture Organization* - Nutraĵa kaj Agrikultura Organizaĵo) okupiĝas pri la gravega problemo de malsato en la mondo kaj ĉefe esploras la metodojn por ĝin venki aŭ almenaŭ ĝin klopodi malpliigi, pliprofundigante siajn sciojn pri la ne tiom kutimaj manĝaĵoj, kiaj povas esti insektoj kaj meduzoj.

Samtiel laboras ankaŭ multaj aliaj internaciaj organizoj, kiuj strebas defendi kaj protekti la bonstaton de la bestoj, medio kaj homara sano. Alia afero prikonsiderindas: insektoj kaj meduzoj estas valida alternativo, ĉar ambaŭ estas efikaj proteinofontoj, precipe por tiuj popoloj konstante suferantaj pro ekstrema malriĉeco. Plie, temas pri manĝaĵoj, kies produktado ne havas tiom altan poluan efikon sur la medion, se oni komparas ĝin kun ekz. la bredado de bovoj.



Ĝia scienca nomo estas *Rhizostoma pulmo*, alinomita 'mara pulmo'. Ĝia ombrelo povas havi eĉ duon-metran diametron. Kutime ĝi estas blankeca, kun bluaj randoj, foje tute blua, kaj ne estas danĝera.

Foto de ElDo - Molo Audace, TS

Ni pripensu ankaŭ la alian flankon de la medalo: en ĉi lastaj jaroj kelkaj meduzspecioj iĝis preskaŭ plago por nia maro. Pli kaj pli ili abundas, ĉar mankas la naturaj predantoj, kiaj estas, ekzemple, testudoj, kiuj male ol la meduzoj pli kaj pli malabundas. Do tuj ekestas alia demando: kial ne provi limigi la problemon per simpla rajtigo de ilia konsumado?

Sed tie ĉi stariĝas malhelpo: kiel akiri meduzojn? Unue, la itala merkato, laŭ mia scio, ne disponigas ilin. Due, malkonsilindas mem kapti ilin en la maro, precipe se oni ne estas spertuloj. Tiel farante, oni povus endanĝerigi sian vivon, ĉar por tiuj bestoj validas la sama principo kiel por fungoj: iuj specioj estas venenaj, tial necesas bone koni ilin antaŭ ilia surtabligo! Alia rekomendo estas, ke ili devas esti freŝaj. Okaze ke iel oni sukcesu iujn aĉeti de fidinda provizanto, unua farendaĵo estas depreni la pikantajn tentaklojn. La manĝebla parto estas la ĉapelo, kiun oni devas bone lavi, boligi en akvo kun vinagro por forigi la eventualajn toksinojn, trempi poste en pasto el faruno, akvo kaj salo kaj fine friti aŭ brezi en pado.

Se ne aĉeteblas freŝaj meduzoj, eblas ilin trovi en kelkaj bazaroj vendantaj aziajn nutrovarojn.

Probable inter vi, escepte de azianoj kiuj tute ne havas problemojn akiri tiun bongustaĵon, havis jam la ŝancon gustumi meduzon en iu restoracio de via lando, pionire provizita per nefacile akireblaj kaj preskaŭ raraj manĝaĵoj. Estus interese ekscii pri via sperto: legantoj kaj mi estas tre scivolemaj.

Dum vi klopodas aĉeti meduzon por mem ĝin pretigi, jen danke al noviga agado de iu fama kvinstela kuiristo, mi sukcesas proponi al vi recepton, realigitan enkadre de la projekto *Blua Tablo*, evento iniciatita de *Marevivo* [Viva maro] kun la kontribuo de la itala Ministerio pri medio. Tiu evento celis la estontajn kuiristojn, nun vizitantajn hotellernejojn, por ke ili plivastigu siajn konojn pri la maro kaj lernu, kiel utiligi ĝiajn rimedojn daŭripove.

→

Recepto:

Meduzo kun mocarelo el bubalina lakto kaj pistita ŝaŭco el kukurbaj floroj.

Senigi la meduzon je la tentakloj, forigante plej grandan parton de la piksubstanco. Marini ĝin iom da tempo en salo kaj sukero, tiel ke ĝi senakviĝu, kaj poste trempi ĝin en marakvon. Post tio forigi la troan marinaĵon kaj dufoje ĝin lavi per sensala akvo, tio por depreni la salecon kaj elimini la urtikajn sporojn. La speciala eco de tiu ĉi manĝaĵo estas la kontrasto inter la diversaj gustoj kaj konsistoj de la ingrediencoj: ekzemple via gustosenso frandos la diferencon inter la dolĉeco kaj moleco de la mocarelo kaj la travidebla kalozo de la meduzo. La saŭco konsistas el boligitaj kukurbfloroj, poste malvarmigitaj kaj pistitaj en pistujo antaŭŝmirita per ajlo, al kio oni aldonas iom da pinfruktoj. La tuto kuŝos sur folioj de ruĝa rapo.

Simple, ĉu ne? Provu, provu, kaj poste bonvolu skribi al mi viajn impresojn! Dankon!

Kaj nun por fini kaj malkaŝi al vi, kie facile troveblas la bezonataj meduzoj, jen kelkaj fotoj pri meduzoj faritaj en centra parto de Triesto, ĉe la kajo Aŭdaca, en aprilo pasintjara. Baldaŭ ili revenos, do ek al meduzkaptad'!





Noto:


1) **tempuro** *(japana kuirarto)*: manĝaĵo, konsistanta el fiŝoj, salikokoj k legomoj, frititaj en pastaĵo [nPiv]. Kiel legomoj, ordinare oni uzas melongenojn [Japane: Nasu], fungojn [Kinoko], kukurbo [*Kaboka*], dolĉan terpomon [*Satsumimo*], karotojn k/aŭ kukurbetojn, tranĉitajn en 2-milimetre dikajn strietojn [*Kakiage*]. La vorto *Tempura* aperas en la 16ª jc, kiam jesuitaj misiistoj migrintaj de Portugalujo al Japanujo alportis sian kutimon friti legomojn trempitajn en miksaĵo el ovoj kaj faruno dum la Karesma fastperiodo, nome dum unu el la Kvar *Tempora (= kvar serio da tri tagoj - merkredo, vendredo kaj sabato - dum kiuj oni strikte observis la regulojn de fastado kaj abstinado)*. Do, preskaŭ logike "tempora" iĝis "tempura". En la sekvaj jarcentoj, tamen, la japanaj kuiristoj pliriĉigis tiun simplan pladon per marfruktoj, kio gajnis ĉies aprobon.

Fontoj: "Vagante tie kaj tie en interreto!" Supraj fotoj de ELDo

Informo lastminuta:

El la triesta tagĵurnalo *Il Piccolo*, marto 2023, pri la ĵus alvenintaj meduzoj en la haveno.

[...] De antaŭ du semajnoj du tipologioj kunvivas en Triesto. "La unua - asertas esploristino OGS, (Nacia Instituto pri eksperimentaj Oceanografio kaj Geofiziko), Tiziana Tirelli - temas pri la *rhizostoma pulmo*, dum la dua pri *aequorea*, kiu estas multe pli malgranda kompare kun la alia. Ambaŭ estas *hidromeduzoj*, aperantaj ordinare ekde februaro ĝis majo. Sed la *aequorea*-j jam de jaroj ne videblis". Ĝi famiĝis "ĉar en iu speciala ekzemplero de la sama specio, nome la *aequorea victoria*, oni sukcesis izoli proteinon, eligantan verdan fluoreskan lumon [Noto 1]. Danke al tiu ĉi proteino, estis akirita grandioza progresado en la biomedicino". [...]



Konklude de la artikolo la esploristino alvokas la legantaron, informi kiam oni ekvidas ĉeeston de meduzoj en la golfo, ĉar tio estas fundamenta, por la monitorado de la maro.

Noto 1 - Pro tiu eltrovo estis asignita la Nobel-premio pri Ĥemio al tri usonaj sciencistoj: Osamu Shimomura, Martin Chaflie, Roger Y. Tsien. La kialo estis: *la malkovro kaj progresigo de la verda fluoreska proteino GFP*.

Di Mnolf - Photo taken in the Monterey Bay Aquarium, CA, USA, CC BY-SA 3.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=727670

Rido sanigas



Ricevita de mia belga amiko **Raymond Demarche** - absoluta veraĵo!

Okazis la 28an de januaro 2016, kiam mi estis operaciita pri katarakto.

Vestita de la tipa ĉemizo hospitala, kiu ĉiam montras viajn sidvangojn, mi atendis mian vicon en dulita ĉambro.

Flegisto prenis bazajn parametrojn de mia korpo. Li kunportis ujon por en ĝin deponi miajn dentojn.

- Neeblas: mi havas nur miajn, proprajn dentojn.

Flegistino poste metis en la operaciotan okulon pasteton por sendolorigi ĝin.

- Ne forgesu forigi viajn dentojn! ŝi diris.

- Neeblas. Mi ne havas dentan protezon.

Du brankardistoj venis por direkti min al la operaciejo. Vidante la malplenan ujon sur mia noktotablo: - Ĉu vi forprenis viajn dentojn?

- Neeblas. Mi ne havas falsajn dentojn.

Ili kondukis min, kuŝitan sur la brankardo, ĝis atendejo, apud la operaciejo. Viro, blanke vestita, pasis apud mi, atendanta, kaj ankaŭ tiu denove demandis: - Ĉu vi forigis viajn dentojn?

- Neeblas. Mi ne havas dentaparaton.

Pri kio okupiĝas tiu nekonato???

Sed kiam, en la operaciejo, la anestezisto demandis min, ĉu vi forigis viajn dentojn, mi ekridegis.

- Kial mia demando kaŭzas ridegon? li diris. Malofte ke operacionto ridu antaŭ operacio.

- Sinjoro Doktoro, vi estas la KVINA homo kiu faris la saman demandon. Estas ege komike. Mi ne kapablas forpreni artefaritajn dentojn, ĉar mi ne havas tiajn en mia buŝo.

- Mi demandis tion, ĉar vi ŝajnas raraĵo. Je via aĝo ĉiu operacionto havas malplenojn ĉe la antaŭaj dentoj. Mi rimarkis, ke tio ne okazas ĉe vi: jen tial mia demando.

Mi tamen iomete mensogis. Mi ne plu havas miajn kvar saĝodentojn: unu estis elradikigita en Mariakerke, alia en Aythaya (Tajlando), du en Verviers.

Sed tiuj malfruaj dentoj ne kreskas ĉe ĉiu adoleskanto. Mia patro ekzemple ne havis saĝodentojn.

Decembre 2020, dum izoliteco.



Radiaj Alirprogramoj RAI Radio Uno

5-a de majo	14h50 - Trans la limoj: pli bone per Esperanto
29-a de majo	14h50 - Komunikado en reta mondo: Esperanto unuavice!
23-a de junio	14h50 - 9 minutoj kun… la plej gravaj rendevuoj en la jaro.

Vojaĝi

«La mondo estas la hejmo de l' homaro», kantas Tagore.

Neniam kiel dum ĉi tiuj jaroj, danke al turismado kaj nun pro tutmondiĝo, montriĝis tiel vera la eldiro de l' granda hinda poeto.

Sed, "bone" vojaĝi signifas ankaŭ esti celkulture motivataj, pretaj renkontiĝi kun la aliaj eroj de la homa mozaiko, kun malsamaj kutimoj, kun nekonataj moroj, kun neniam antaŭe spertitaj manĝaĵoj.

En sia eseo De America, verkisto Guido Piovene rimarkigis, ke «vojaĝi devus esti faro de humileco», nome elhejmiĝi nur kiam iu deziro lerni puŝas onin. Kontakto kun tute diferencaj civilizoj, ĉiam estas mense kaj spirite riĉigfonto. Krome la ekstrema vario de cikloj, teroj kaj maroj, havas la povon veki en ni emociojn de sublima beleco.

Ĉie ajn troviĝas la belo, la spuroj de la civilizacio lokiĝas tie, kie la historio trapasis. Pripensu la templojn de Majaoj sur Andoj, la barko-popolon *Tanka*, nomata la *maraj ciganoj* en la ĉina maro, aŭ, pli proksime al ni, en Italujo, la *Ŝtonoj*-n de Matera aŭ la *Nuragoj*-n situantajn en Sardinio.

Memorigas al ni la Psalmo 113-a:

La ĉielo estas la ĉielo de la Eternulo,
sed Li donis la teron al la homidoj

ne nur por ke ili ĝin kultivu, sed por ke ĝi fariĝu objekto de ilia mirego kaj de ilia talento.

Vojaĝante la homo leviĝas super sian etanimecon por malkovri la allogon de nekonataĵo.

Renkontiĝante kun la aliulo, li pliriĉiĝas ĝis kiam li mem tion ĉi deziros kaj, nur tiel farante, kapablos ekkompreni liajn pensojn, liajn pasiojn, liajn revojn.

Sed nur neŭtrala lingvo - Esperanto - havas tiun specialan econ ekirigi dialogon, unikan, intiman kaj taŭgan por reciproke interkompreniĝi… kaj ami unu la alian.

Viglo



Serĉante ion en mia komputila arkivo, mi trovis la supran penson de Viglo, nome Giuseppe Valente, nia tre kara TEA-ano forpasinta jam preskaŭ antaŭ naŭ jaroj. Lia memoro ankoraŭ ne kovriĝis per densa polvo, ne, tute ne. Ĉiam li restas kune kun ni, tial kun nostalgio mi proponas al vi ĉi tiun lian penson, plene spegulantan lian karakteron.

Kaj, kiel ofte li aldonis je la fino de artikolo, de li verkita por nia TEA-Bulteno,…

Meditu, homoj, meditu!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO ETS-ODV
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT53 U0200802242000102990439
Reto: esperantotrieste@gmail.com nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org;
www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

Uno per tutti … cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina
senza costi per voi!

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.

Come fare ?
È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2022 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

numero di codice fiscale dell'Associazione Esperantista Triestina ETS-ODV

Considerando anche l'attuale situazione e ringraziando per l'appoggio che ci potrete dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA
Il Presidente
(Edvige Ackermann)

Associazione Esperantista Triestina ETS-ODV 90012340320
Associazione Esperantista Triestina ETS-ODV 90012340320
Associazione Esperantista Triestina ETS-ODV 90012340320
Associazione Esperantista Triestina ETS-ODV 90012340320
Associazione Esperantista Triestina ETS-ODV 90012340320
Associazione Esperantista Triestina ETS-ODV 90012340320
Associazione Esperantista Triestina ETS-ODV 90012340320
Associazione Esperantista Triestina ETS-ODV 90012340320
Associazione Esperantista Triestina ETS-ODV 90012340320
Associazione Esperantista Triestina ETS-ODV 90012340320